Kurso pri verkado en Esperanto

**Instruisto: Trevor Steele**

# Leciono 02

**Hodiaŭ mi proponas al vi du temojn: tonon kaj infanspertojn**

## TONO

Laŭ PIV, tono = nuanco de la voĉo, maniero alparoli, per kiu oni esprimas siajn sentojn. Kian tonon vi trovas en la subaj tekstoj? Kiel, per kiaj rimedoj, oni atingis tiun tonon?

**El *Estrino*** (de porknabina internulejo, dum asembleo)

La belega instruistino pri dramo glitis senpeze antaŭen por anĝele alrideti nin de apud la stango de la mikrofono. Dio, mi pensis, ŝi ja estas bela eĉ en tiu nigra talaro! Duono de la knabinoj en nia senknaba mondo enamiĝus al La Follby, se nur ŝi havus cerbon: eble nia generacio tro postulas. Kiel ŝi sukcesis instruistiniĝi, estis unu el la misteroj, kiujn oni simple akceptu, simila al la Dia Triunuo. Ni cerbumis inter ni, ĉu f-ino Follby kapablus kalkuli ĝis dek, sed, kiel iam spritis s-ro Lockie, se oni aspektas tiel, oni ne devas esti geniulo.

Tono: moka / envia / ironia /
Rimedoj: kondicionaloj / komparoj /

**Olda Johano memoras**

Vidu, ĝenas min, ke ĉe ĉiu vizito aŭ telefonvoko miaj gefiloj, genepoj kaj pragenepoj tuj demandas, "Kiel vi fartas?". Kaj tio ne estas kutima sensignifa vortbalono; ĝin sekvas "Ĉu vi glutas viajn medikamentojn?", "Ĉu vi kontrolis vian sangopremon?" "Viro naŭdektrijara devas esti tre singarda ..." Eĉ Zilda, mia edzino, ankoraŭ okdekkvinjara junulino, daŭre memorigas min pri tiaj bagateloj. Estis ŝi, kiu insistis, ke ni loĝu ĉi tie en granda urbo: "Ni devas esti proksimaj al kuracistoj kaj hospitaloj, kara ..." Karcerulo en milionhoma koncentrejo, mi tre ofte pensas pri Rozvalo.

Rozvalo tute ne havis hospitalon, nek kuraciston. En Rozvalo la malsanaj pensiuloj ne ĝenis siajn kunvilaĝanojn, ili simple dece mortis sen granda umado. Bedaŭrinde mi estas la lasta vivanta ano de mia iama lerneja klaso, kio nur pliigas mian nostalgion pri la hejma vilaĝo.

Aĥ jes, Rozvalo! Tie, kie mi unue vidis la lumon de la suno kaj flaris la odoron de sovaĝaj floroj. La rivero, la ĉirkaŭaj montoj kaj arbaroj estis fontoj de senfina esplorĝojo.

Tono: nostalgio / amara / kontrastoj / malĝoja / bonhumora / sopira
Rimedoj: kontrastoj /

**Bokaĉo (Boccaccio) pri la pandemio en Florenco en 1348**

Civitanoj evitis unu la aliajn; apenaŭ najbaro zorgis pri najbaroj, parencoj neniam aŭ preskaŭ neniam vizitis sin. Krome, tia teruro eniris la korojn de viroj kaj virinoj pro tiu katastrofego, ke frato forlasis fraton, onklo forlasis nevon, fratino sian fraton, kaj tre ofte edzino sian edzon. Eĉ pli malbone kaj preskaŭ nekredeble estas, ke gepatroj rifuzis vidi kaj prizorgi siajn infanojn …

La mizero de la malaltaj kaj grandparte la mezaj klasoj estis eĉ pli plorinda. Plejmulte ili restis en siaj domoj, aŭ pro malriĉeco aŭ en espero esti sekuraj, kaj ili malsaniĝis milope. Ĉar ili ricevis nenian flegadon kaj atenton, preskaŭ ĉiuj mortis. Multaj finis sian vivon surstrate tage kaj nokte; kaj pri multaj aliaj, kiuj mortis en sia domo, oni sciis nur pro tio, ke la najbaroj ekflaris la putrantajn kadavrojn. Kadavroj plenigis ĉiun angulon …

Tono: zorgoj / timo / hororo / katastrofo / kompato / senespero
Rimedoj: ripeta ritmo / universala mizero /

**El letero de Max Zeller (soldato de germana *Freikorps,* kiu masakris civilulojn en la urbo Hagen)**

Ni mortpafas eĉ la vunditojn. La entuziasmo estas grandega – nekredebla. Ĉiuj, kiuj trafas en niajn manojn, unue ricevas baton de fusilkolbo al la kapo kaj poste morton per kuglo. Ni eĉ mortpafis dek ruĝkrucajn flegistinojn, ĉar ili portis pistolojn. Ni mortpafis tiujn etajn damojn kun plezuro -- kiel ili ploregis kaj petegis nin permesi al ili vivi! Ha, tio atingis nenion!

Tono: terura / brutala / senkompata / masakrado / sangosoifado
Rimedoj: ripeto de brutalaĵoj /

## El la romano *La sangoruĝa flago*

Li mansignis ekster la kaleŝon, " Rigardu tiun grandiozan arbon."

"Tiun eŭkalipton kun la blanka trunko?"

"Jes. Vidu kiel granda kaj impona ĝi estas. Tuta universo por insektoj kaj birdoj. Kaj ĉi-ĉio venis el unu semeto programita. Mi ne povas imagi, ke la semo programis sin. Ne necesas sanktaj libroj kaj ritoj, ke oni vidu en tio spuron de io neimagebla sed iel ĉeesta."

Tono: konkludas, ke estas Kreinto / miro / admiro / adoro /
Rimedoj: apelacias al naturaj fortoj /

## NI KREU ETOSON PER NIA TONO

***Li/Ŝi/Mi/Ni sidis/sidas/sidos sur benko en homplena butikumejo kaj observis/observas/observos la preterpasantojn.***

Elektu vian **tonon**
(ĉu gaja/sarkasma/malfeliĉa/kolera/satira/filozofiema/amara/admira ...)
kaj iom daŭrigu la rakonton dum 5-6 minutoj.
Verku!

**Mia infanaĝo**

Foje la plej memorataj eventoj de nia vivo estas tiuj el niaj plej fruaj jaroj, ĉu agrablaj ĉu malagrablaj. Por iom sproni vian memorpovon mi citas iomete el tia rakonto el mia infanaĝo. Post la legado mi petos vin surpaperigi ion similan el via vivo. Se vi volas sendi vian rakonton al mi, <wtrevorsteele@gmail.com>, mi volonte legus.

*Mi estis revema knabeto tri-kvarjara, evidente scivola pri la mistera mondo de skribaĵoj. Eble por sproni tiun laŭdindan intereson miaj gepatroj aĉetis "edukan" telereton, el kiu mi manĝu. Rande de tiu metala telero estis la literoj de la angla alfabeto kaj la ciferoj 1 ĝis 9. Tiuj formoj ja ekzercis mian junan fantazion, kaj sendube miaj ripetiĝemaj demandoj pri ili, kaj la fakto, ke mia jam ĝene malrapida manĝritmo iĝis eĉ pli trenata, foje pensigis Paĉjon kaj Panjon, ke estus preferinde kaŝi la edukan telereton kaj redoni al mi la malnovan seninteresan blankan bovleton.*